

12 Post la fino de la ekzercoj vi trovos alian ekzamenon. Ĝi estas la dekan ekzamenon, la Postekzamenon. Faru la ekzamenon, kaj kalkulu viajn rezultojn. Ĉu vi lernis multe da vortoj per la Vortlernigilo?

Kiel fari la ekzercojn de la Vortlernigilo

Eble la sistemo de programita lernado uzata en ĉi tiu libro estas iom nova por vi. Ne zorgu. Mi montros al vi detale kiel vi povas profiti el la Vortlernigilo.

Unue, iru al paĝo *9. Tie troviĝas kvar kolonoj de numeroj kaj vortoj. Unu el tiuj kolonoj konsistas el vortoj. Vi povas vidi ke la supra vorto estas *kialo*. Sekve estas la vorto *plie*. Ĉu vi vidas la kolonon kaj tiujn vortojn?

Bone. Nu rigardu la kvar elementojn de la supra parto de la kolonoj. En la unua lineo estas la numero 1, la litero k, kaj la vorto kialo, kaj la litero r. En la dua lineo estas la numero 32, la litero a, la vorto plie, kaj la litero r.

Kio estas tiuj kvar elementoj?

La unua kolono *1, 32, 63... 1210* estas la numero de la vortoj.

La dua kolono *k, a, e... a* estas la unua litero de la sinonima vorto kiun vi devas doni.

La tria kolono *kialo, plie, troo... rekoni* estas la vorto kies sinonimon vi serĉas.

La kvara kolono *r, r, r... r* indikas, ke la sinonimo kiun vi serĉas estas radikoj. Ĉe la piedo de la paĝo vi povas vidi la signifon de la simboloj de la kvara kolono.

Nun, ni komencu kaj uzu vian Vortlernigilon.

Iru al la paĝo 9. Komencu per la unua vorto *kialo*. La dua kolono indikas, ke la sinonimo komenciĝas per la litero *k*. La lasta kolono indikas, ke la serĉata vorto estas radikoj (ĝi ne havas nek prefiksojn, nek sufiksojn). Kiu vorto povas esti tiu?

Iru nun al la sekva paĝo, ĉar estas ĉiam la sekva paĝo kiu havas la respondon. Vi trovos la respondon maldekstre ĉe la numero 1. La respondo estas la